- Esprimas, ke la estraro ellaboru senpagan kotiznivelon por esperantistoj en prizonoj
- Memorigas al la estraro, ke grandaj decidoj kiel dungigo de nova ĝenerala direktoro kaj defino de tio estu faritaj kun la partopreno de la membraro, kunvenanta en kongreso
- Informas la estraron kaj la nomumkomitaton, ke ili preparu por procezo de novigo de la organizo kaj transiro de multaj taskoj kaj postenoj dum la venonta jaro, inter aliaj la postenoj de prezidanto, vicprezidanto, kaj ĝenerala direktoro
- Dankas la multjaran kaj valoran laboron de la Ĝenerala Direktoro Bill Harris,
- Deziras, ke la estraro kaj nomuma komitato dum la venonta jaro serĉu vaste kaj malferme dum la venontaj monatoj por havi plurajn proponojn por eventualaj novaj Ĝeneralaj Direktoroj kaj lokoj por la centra oficejo dum la venonta 3-5 jaroj
- Deklaras, ke la fina decido pri ŝanĝo de CO estu farata de la venonta landa kongreso en 2023

Leterkesto

On Esperanto accents (or the lack thereof)

Our last issue featured an article from 1917 arguing that the then-new language of Esperanto would not split into dialects because, among other things, “[t]he uniformity of the accent and pronunciation [...] by the peoples of various nations has long been a commonplace observation” at international congresses. In response, George offered this thoughtful comment.

I’ve certainly had the experience of not being able to guess the nationality of another Esperanto speaker (and also had people not correctly guess my nationality). On the other hand, I’ve also encountered people who still had an easily identifiable accent, even when they spoke Esperanto with great fluency. Duncan Charters has regaled party-goers for decades with his “**round the world in Esperantujo**” routine <<https://youtu.be/WVic8eP5DUM?t=875>> in which he seamlessly passes from one country’s phonological peculiarities to the next.



Also, I think there’s great validity in Claude Piron’s criticism of the “Okcidenta Dialekto,” i.e. the tendency of English-speakers and Western Europeans generally to use word-roots taken from their own languages (generally often Greek and Latin roots), instead of using the word-building facility Zamenhof built into the language to create a clear concept using basic Esperanto roots. It just makes it that much harder for people whose mother tongues are linguistically remote from Western languages to learn Esperanto, such as Asians.

— George PARTLOW

La lingvo de paco

Artikolo en № 2022:2 argumentis, ke daŭre ripeti mitojn pri Esperanto ne estas la plej bona maniero por reklami ĝin. Inter la mitoj listigitaj aperis la aserto, “Esperanto estas la



lingvo de paco.” Mi kredas, ke tiu ”mito” fakte estas vera.

Estas bone dokumentite, ke Zamenhof intencis, ke Esperanto estu rimedo por transponti kulturajn dividojn. En sia alparolo al la Unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905, li diris:

Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.

Zamenhof sciis, ke Esperanto ne subite kreos mondan pacon. Li daŭre kredis, tamen, ke neŭtrala lingvo por internacia komunikado povus havi pozitivan influon. En sia parolado al la Dua Universala Kongreso de Esperanto en 1906, li diris:

Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

Pro siaj klopodoj, Zamenhof ricevis **14 nomumojn** <<https://bit.ly/3Uoq1tL>> por la Nobel-premio pri paco. Post lia morto, la Universala Esperanto-Asocio daŭrigis lian laboron, kaj ĝis nun ĝi ricevis **pli ol 100 nomumojn** <<https://bit.ly/3qRsmiX>> pro sia “kontribuo al monda paco permesante al homoj en diversaj landoj eniri rektajn rilatojn sen lingvaj baroj.”

Ekde sia fondiĝo, la Unuiĝintaj Nacioj por Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo (Unesko) strebas “**konstrui pacon per internacia kunlaboro**” <<https://www.unesco.org/en/brief>>. En 1954 kaj denove en 1985, la organizo faris rezoluciojn agnoskantajn la promeson – kaj rezultojn atingitajn – de Esperanto.

Pli lastatempe, karakterizi Esperanton kiel “la lingvo de paco” estis rimarkinda parto de **la afiŝoj por**

Esperanto-tago 2022 <<https://bit.ly/3DBTutP>>.

La mondo verŝajne ne estas tiel paca, kiel Zamenhof esperis, sed espero estas centra por esti esperantisto.

Mi pensas, ke aludi Esperanton per “la lingvo de paco” estas agnosko de la historio de la lingvo, sed ankaŭ spegubildo de la esperoj, kiujn multaj esperantistoj kunhavas pri la estonteco.

— Joshua HOLZER <josh.holzer@westminster-mo.edu>

Mamo


senintenca esperantaĵo • Margo COHEN



En 2011, leganto trovis unu mamon en Miĉigano, kaj nun, danke al Margo COHEN, troviĝas alia en Hilo, Havajo.

Malama

senintenca esperantaĵo • Margo COHEN



De Havajo leganto Margo COHEN afable sendis al ni la jenan foton, kiu reklamas ian “malama-terapion” ...

Sed ne timu – almenaŭ ne pro la nomo. En la havaja, *mālama* (kun akcento sur la unua silabo) havas plurajn signifojn, inkluzive de “zorgi” kaj “konservi”. La reklamanta firmao ofertas diversajn kuracajn servojn, ekzemple akupunkturon kaj jogon.

De la Redaktoro: Joshua tute pravas, kompreneble, ke la Esperanto-movado havas fortan kaj bone konatan ligan al pacifismo. Tamen en sia artikolo en № 2022:2, Chuck MAYS efektive ne nomis tiun ligan “mito”; li nur listigis la frazon “Esperanto is the language of peace” inter “mostly false or unsupportable ‘facts’” per kiuj oni foje (mis)reklamas la lingvon.

Eble estus pli klare diri, ke tia frapfrazo estas tro simpla. Jes, ekzistas nekontesteblaj ligoj inter la movado kaj pacifismo, sed parolantoj de Esperanto uzas la lingvon por ĉiaj celoj, efektive – ne nur pacaj. Kaj inverse, por la granda plejparto de pacifistoj kaj pacamaj organizoj, Esperanto restas neuzata kaj eĉ nekonata. Certe, Esperanto estas “a language of peace” ... sed ĉu “the language”?

Por eksteruloj, tiaj nebulaj asertoj povas ŝajni naivaj kaj eĉ ofendaj. En sia libro *Esperanto sen mito* <<https://bit.ly/3R3C3oQ>>, Ziko SIKOSEK diris: “Nomante sian lingvon lingvo de paco, de racia kaj justa komunikado ktp, esperantistoj sin mem filaŭdas kaj emfazas sian grupan superecon je aliaj grupoj.” Laŭ Sikosek, estas pli grave – kaj sendanĝere – informi pri la nekontestebla realo, ke “Esperanto estas vera vivanta lingvo kun parolkomunumo [...] en kiu ĉiu ano povas senti sin plenrajta membro.”

Eĉ se ni ne unuanime konsentas pri tiu aserto, eble ni tamen povos profiti de lia jena konsilo: “Ĉiu esperantisto povas rakonti pri personaj spertoj, kiuj ofte estas tute neimageblaj al eksteruloj. Konkretaj spertoj kaj veraj homoj el foraj landoj estas la plej konvinka rimedo por atentigi la publikon pri la ekzisto de tiu fenomeno.”

La vivo de Peĉjo

Ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Report from the Montreal UK

kongresaj raportoj • Brandon SOWERS



Photo: Alex Miller.

Esperantists will long remember the ~~2020~~ 2022 *Universala Kongreso* (UK) in Montreal as a significant one in the history of our movement. The first UK in three years, the first one in North America in almost forty, and the first one in Eastern North America since Zamenhof went to Washington in 1910. More subjectively, it was the first significant opportunity for the movement to come out of its “online hibernation,” the first moment for many “pandemic Esperantists” to experience living Esperanto culture in person, and the first time for many of us to see old friends (whom we had perhaps never met in the real world). Setting that sentimentality aside, I can honestly say that this UK had many elements which set a new standard, far beyond the two previous UKs that I attended. But more on that later.

Whatever significance the UK will claim in the history of the international movement, there’s no doubt in my mind that this UK (and the *Landa Kongreso* of Esperanto-USA that took place as a part of the UK) will absolutely go down as the start of a new chapter for the Esperanto movement in the US. I think everyone who was there probably feels similarly. For everyone else, I’ll do my best to give the sense of it, or at least of the parts that I saw—the UK was so rich in programming that I often had to make hard choices about what to attend!

Day 1: Saturday, August 6

There is a system of large underground corridors

beneath UQÀM (the University of Quebec in Montreal), our *kongresejo*, allowing students to move between buildings in the winter without braving the elements. One of these corridors has been converted into the *Movada Foiro*, where various parts of the movement are able to present their work: everything from the Swiss or Nepalese Esperanto associations, to TEJO (the international youth organization), various publishers, even the international Esperanto jurist association. I’m on double duty, running back and forth between the vegetarians and the left-wing SAT. Esperanto-USA also had a table, and although there was apparently miscommunication on the board about who would bring our materials, Vice President Alex Miller saved the day with information about the *Usona Bona Film-Festivalo*. Even amid the chaos, I’m able to see many old friends and acquaintances. Just as interestingly, there are many people I’ve never met before, including a large number of Americans. The *foiro* seems to be functioning as an informal meet-and-greet just as much as its official purpose, and the building excitement is palpable. As the *foiro* comes to an end, I join several other Americans—friends whom I’ve only seen on a screen, friends whom I’ve never met before—for an informal *bierumado*, which became one of our running traditions, where we were able to process the past day and share our excitement about the coming one.

Day 2: Sunday, August 7

The morning is reserved for the *Solena Malfermo* to officially open the UK. It’s in *Salono Zamenhof*, a large old-school theater. It’s simultaneously official, professional, and festive. There is a powerful moment where participants are going to be asked to stand by continent, except for those from Canada and the “*najbara lando*,” who are asked to stand separately. This is the first time where it becomes clear how deep the representation from Canadians and Americans is. I had been worried that there might be very few Americans in particular, even when one of the organizers remarked two weeks ago that there had been a sudden influx of registrations from the US (due to NASK, perhaps?). And now it was clear that

we had, in fact, turned up—Americans and Canadians together made up about half of the participants, relatively equally divided between the two nations. Greetings for the Americas were poignantly given by Jaboti Potiguar, a representative of Brazil’s Indigenous peoples, and Chelsea Rae Moses, an American, both part of the “pandemic generation” of Esperantists.

In the afternoon I co-lead a presentation about SAT, with a focus on some less-known aspects of its history in North America. Just after this, the Esperantic Studies Foundation gave an update on its activity, including a presentation by Hans Becklin and others on their research project on the history of the Esperanto youth movement. Both were well attended and fostered good discussion.



The *internacia arta vespero*. Photo: Alex Miller.

In the evening, we returned to the theater where the congress organizers had given a new—and very appropriate—spin to the traditional *Nacia Vespero*, in which there is usually a presentation of music, dance, and culture representative of the country hosting the UK. Instead, we had a *Multnacia Kanada Vespero*, accurately reflecting the existence of many nations and cultures within Canada: Mohawk drummers, an Inuit throat singer, a French-Canadian folk dance troupe whose fascinating style seemed to combine Contra dance with tap, and musicians playing traditional Irish music. The evening ended with a collaborative jam session between all of the artists in a sort of musical Esperanto.

Day 3: Monday, August 8

The morning saw the presentation of the results of this year’s *Belartaj Konkursoj*, the traditional literary

contest with multiple branches. This year saw a very steep competition with over 170 submissions. Two Americans were awarded or honorably mentioned, a first since 2011: Rafa Nogueras, from Puerto Rico, won second prize in *Prozo*, and I was honorably mentioned in *Monologoj/Skeĉoj* for a short theater piece.

After this was the *Solena Malfermo* of Esperanto-USA’s convention. Roughly 50 were in the room, taking almost all of the seats. The session got off to a rough start, with the President trying to lead the meeting over Zoom, unable to effectively interact with the participants due to technical issues. Additionally, without a clear agenda, the meeting foundered. After a while, I intervened, suggesting that we had a lot of people and a lot of energy, and had a huge opportunity to have discussions in-person about the future of Esperanto in the US. (My timing could have been better, as I was called on just after the President had mentioned members who had passed away in the past year.)

Despite the unfortunate timing, the proposal was met with overwhelming enthusiasm. We chose Hans Becklin to lead a guided discussion to set priorities, and were able to take an additional hour in the room thanks to the graciousness of the organizers. Three overwhelmingly clear priorities came out of this meeting: *kultura agado*, *retaj eventoj kaj klasoj*, and *kialoj (re-)membriĝi en E-USA*. Afterwards, one veteran member of Esperanto-USA said it was one of the most exciting meetings they had seen since joining years ago, and several others made similar comments. It became clear that the one *aferkunsido* which had been planned would not be enough, and thanks to the effort of Secretary Charlotte Burton and Alex Miller, we were able to secure three additional sessions, one for each of the priorities coming out of this meeting.

With the meeting running late, we had just enough time for a quick dinner prior to the *Kongresa Balo*, where many of us stayed dancing *ĝis la nokto-nokto fin’*, or at least until the hotel said we had to turn off the music!

Day 4: Tuesday, August 9

In the morning, a new literary contest—*Interkultura*

Novela Konkurso—had its own debut award ceremony, in an *efemera artgalerio* full of beautiful art, including two interesting new paintings of Zamenhof by a local artist. Rafa Noguerras almost swept the awards for Puerto Rico, winning both first and second prize for his short stories, which can be read in the printed collection *Amo, tuso, kaj forpaso*. Several other Americans have work in the collection.

In the afternoon, we had the first two *laborsesioj* about the priorities defined in the opening session of Esperanto-USA. Both had more than 30 participants. In the first, *Kultura Agado*, Charlotte and Alex did an excellent job helping us to define specific sub-priorities, such as podcasts, theater, and publishing. This resulted in plans already beginning to take shape, such as for conversational and educational podcasts, for improv and scripted theater at NASK, and for bringing additional energy to Esperanto-USA's publishing activities.

The second working session, *Retaj Eventoj kaj Klasoj*, also defined sub-priorities and broke into smaller working groups. I was in one about online writing workshops and reading groups, where we talked about expanding the excellent work already being done by *Bobelarto* into the US. Another group also began plans for regular online classes that would be easily accessible and broadly promoted. (I apologize to the other sub-groups, which I don't have in my notes!)

After a very productive day, we ended the night with another amazing set of concerts in the theater and tried to get some sleep prior to Wednesday, traditionally dedicated to full-day excursions.

Day 6: Thursday, August 11

In the afternoon, we had the third *laborsesio* about the reasons that people would or should join Esperanto-USA or renew their membership. After another priority-setting discussion, we divided into two groups: one to discuss communication, and other to discuss benefits of membership. I sat in the communication group, and the overwhelming consensus was that we need a useful way for Esperantists in the US to be in communication with each other throughout the year, to carry projects forward and to see each other as a part of one

movement. Additionally, the group agreed that we need a better strategy for communication from Esperanto-USA to its members and the public, and a website refresh.

Shortly after this meeting, we had the official *aferkunsido*, in which Treasurer David Beck presented the financial situation and the proposed budget for the membership's approval. His presentation set a new standard of professionalism for the organization! Alex then announced the results of this year's voting, which saw Ruth Keves-Cohen join the board, and Fred Meyer and Charlotte Burton elected for a second term. Charlotte also summarized notes from each of the working groups on the plans which had begun to take shape, to the enthusiasm of the members, and Duncan Charters, president of UEA, briefly spoke at the end to emphasize UEA's desire to work with and support the Esperanto movement in the US.

The UK organizers had already organized some amazing evening entertainment on previous nights, but Thursday's program was *unike elstara*: the debut of *1910*, a new play about Zamenhof's visit to Washington and Montreal in 1910, written and directed by Ĵenja Amis, a former member of the Atlanta Esperanto society (and my first Esperanto teacher). She now lives in Montreal and was a major part of the organizing team for this congress. Several other Americans played major and minor parts in the play: Alena Adler played the supporting role (outstandingly, I should say!), while Elle Beck, Rafa Noguerras, and myself were in a group that asked questions from the audience, and Alex Miller filmed. *1910* will certainly set a new standard for Esperanto theater, and the several minutes of standing ovation after it concluded confirm this. Afterwards, a representative of KEA (the Canadian Esperanto Association) came to the stage to announce that KEA had voted to confer Ĵenja with honorary membership, leading to renewed standing ovations.

Day 7: Friday, August 12

After lunch, I gave a well-attended presentation on the intersection between early sci-fi fan culture and the American Esperanto movement of the 1930s and '40s, including the unremarked debut of Cosplay at our national convention in 1939 (at the NY World's

Fair!), and the forgotten successes of Joseph Scherer (then-president of EANA) in promoting Esperanto in Hollywood, leading to Esperanto in at least two films in the late 30s, one of which has gone unnoticed until now.

After this, we had the closing session for Esperanto-USA's *Landa Kongreso*. Charlotte and Alex read a proposed resolution which included thanks to our hosts, homage to members who have passed since our last in-person meeting in 2019, a summary of the priorities set during the week, acceptance of Raleigh as the host for the 2023 convention, a proposal for free membership for Esperantists in prison, and instructions for this year's nominating committee to begin a broad search for a new General Director so that we can finally allow Bill Harris to take a well-deserved break after many years of hard work for the organization. This was accepted unanimously and our *Landa Kongreso* closed with much excitement and anticipation about what to expect next year in Raleigh.



During one session, participants broke into small working groups. *Photo: Alex Miller.*

In the evening, we enjoyed the traditional Friday *Internacia Arta Vespero*, in which Esperantists from around the world are able to show off their talents. Here, too, Americans were well-represented. I was asked to help host/MC the evening after one of the planned hosts had tested positive for COVID; Alex

Miller roused the audience with several bluegrass songs on his banjo; and Brian Harmon and others sang in the *Internacia Koruso*, closing out the evening.

Day 8: Saturday, August 13

The *Solena Fermo* is always an emotional moment, especially after such a powerful week. But the organizers did a great job with this as well, producing a professional and moving ceremony. I have no doubt that at next year's UK in Torino, there'll be a higher number of Americans than in the recent past (apart from Montreal, of course). And who knows—with the level of energy and enthusiasm that this week will inject into the Esperanto movement in the US, if we keep it up, maybe within a few years we can begin to discuss what it would take to host a UK here—which would be the fourth ever in the US, and the first in over fifty years!

But even if we want to aim big, let's start where we're at. The most urgent next step is for every active American Esperantist to join the Discord server (which is being announced in this issue) so that we can work together on projects such as podcasts, online classes, publishing, and planning an excellent, interesting, and well-attended LK in Raleigh next year. This next year will play a huge role in defining the future of Esperanto in the US—do your part! Get involved, join a project, and include the members of your local club!

Ĝis Raleigh – aŭ Torino!



Brandon SOWERS

Brandon is an American Esperantist from Atlanta, Georgia.


<bsowers@protonmail.com>

Ĉu li bremsis sufiĉe?

Recenzo de la klasika krimromano de Claude PIRON

libroj • Debra HAMEL

Ĉu li bremsis sufiĉe? estas la dua libro en la prikrima “Ĉu-serio” verkita de Claude PIRON kaj eldonita inter 1976 kaj 1986. La serio enhavas kvar romanojn kaj novelaron, publikigitajn sub la pseŭdonimo Johán VALANO, kaj ankaŭ priseksan krimromanon, kiun Piron verkis sub la maldeca



kaŝnomo Johán BALANO. Ciferecaj versioj de la libroj haveblas rete en diversaj formatoj, **ekzemple de Esperanto-Asocio de Britio (EAB)**

<<https://legacy.esperanto.org.uk/eldonoj/piron/>>, sed trovi presitajn ekzemplerojn povas esti malfacile. Feliĉe por legantoj kiuj preferas surpaperajn tekstojn ol surekranajn, EAB ĉi-jare publikigis trian eldonon de tiu verko, kaj surpaperaj ekzempleroj nuntempe facile haveblas de retaj librovendejoj.

La Ĉu-libroj prezentas Janon KARAL, polican detektivon en la fikcia sanktavalala distrikto. Lia nevo Stefano kelkfoje helpas lin en enketoj, sed neoficiale. En tiu ĉi rakonto, Stefano posteniĝas en la urbeto Valmu, kie li laboras malkaŝe kiel garaĝisto, sed kaŝe kiel spiono por sia onklo. Oni taskis al li malkovri informojn pri minacaj anonimaj leteroj ricevita de kliento de la garaĝo, eminenta arkitekto Aleksandro JENDRIK. Sed dum Stefano restas en Valmu, Jendrik kaj la edzino mortas pro aŭtokraŝo veturante laŭ kurba montvojo. Sed ĉu la kraŝo estis vere akcidento? Ĉu Jendrik maltrafis ĝirejon pro distriĝo aŭ ia malsano? Aŭ ĉu temas pri malico?

Ĉi-lastan oni suspektus bonkiale. La mortinta arkitekto malamikigis al si plurajn grupojn de la valmuanoj, kiuj estas dividitaj per politikaj, religiaj, kaj kulturaj diferencoj. Jendrik estis respondeca pri tre malpopulara ŝoseoprojekto, kiu detruus najbaraĵon. Cetere, la lokaj albanoj malamis lin pro lia respektomanko rilate al iliaj enterigaj kutimoj. La kraŝo ankaŭ neverŝajnis akcidenta, ĉar Jendrik estis sperta veturisto, kiu bone konis la vojon, kaj ĉar

mekanikistoj prizorgadis lian aŭton pli frue la saman tagon.

Alveninte en Valmu, Karal intervjuas multajn homojn —mekanikistojn, parencojn de Jendrik, malkontentajn albanojn, malapogantojn de la ŝoseoprojekto, ktp. Li malkovras multe da suspektinduloj, sed ankaŭ multe da alibioj. Kaj ju pli li enketas, des pli komplika fariĝas la afero. Montriĝas, ke multaj sanktavalanoj volas kaŝi ion de la polico — eĉ se tio ne estas ilia respondeco por la murdo de Aleksandro Jendrik.

Enketante, Karal ankaŭ uzas neordinaran procezon — sonĝadon. Miaopinie, rakonti sonĝojn ofte estas mallerta rimedo por enkonduki detalojn en romanoj. Sed ĉi-libre, la sonĝo ne malbonigas la rakonton, kaj la klarigo pri la procezo estas kredinda: Detaloj, kiujn Karal ne sufiĉe atentis maldorme, iutempe sciigas sin per sonĝo (p. 141). La enketmaniero estas aparte interesa pro la ekster-esperantuja kariero de Piron kiel psikologo.

Ankaŭ rimarkinda estas la dialekto, elpensita de Piron, kiun parolas la sanktavalanoj. Laŭ mi, se dialekto estas malfacile komprenebla, oni povas havi malagrablan legsperton. (Ekzemple, mi ne ĝuas legi la Hagrid-an dialekton en la romanoj pri Harry Potter.) Sed la nekutimaj formoj ĉi-libre estas tiel maloftaj kaj kompreneblaj, ke ili ne malĝuigas legadon. Trajtoj de la dialekto inkluzivas la jenajn: “sti” por “esti” (ekz. 20); oftan forlason de o-finaĵo (29, 83); infinitivon post prepozicioj (21, 125); kaj supersignon ĉe akcentita silabo (ekz. “barél” por “barelo,” 20; ankaŭ la pseŭdoniman personan nomon de la verkisto mem: “Johán!”). Piron ofte atentigis legantojn al sia dialektuzo: “Ĉu vere oni publike parolis pri lin murdi?” Jano demandis streĉe, nekonscie uzante la postprepozician infinitivon tipan pri sanktavalala dialekto” (21).

Piron ankaŭ signalas sanktavalan parolmanieron per la verbo “dialekti.” (Li estas la sola verkisto en la **Tekstaro** <<http://tekstaro.com>>, kiu verbigas la o-vorton “dialekto.”) Aliaj rimarkindaj vortformoj,

maloftaj aŭ neniam alie atestitaj Tekstare, inkluzivas verbajn formojn de “ĉu” (28) kaj la interjekcio “uf” (109) kaj ankaŭ la jenajn formojn: “unuvortis” (79) kaj “duvortis” (110); “koridoras” (92); “estmaniero” (41); “plejon” (45); “Stefanujo” (117); “uf-spiron” (146); “tritasa” (92); “bon-onkle” (91); kaj “pastre” (93). La vorta petolemecon de Piron multe kontribuis al mia legĝuo. (Legantoj interesitaj pri la pensoj de Piron pri vortformado eble ĝuus lian *La Bona Lingvo*.)

Ankaŭ petoleme, Piron verkas pri aspiranta verkisto, persono nomita Cezaro BIRMAN, kiu volas publikigi krimromanojn sub la pseudonimo “Johán Valano” (136)!

Oni prezentis Birman/Valano al Karal kiel “libristo.” La termino estas ambigua – komparu “book guy” angle – kaj Piron atentigas pri la ambigueco en dialogo, kiu substrekas la flekseblecon de Esperanto:

“Mi ne volas esti maldiskreta,” mensogis Karal, kiam ĉiuj ree sidis, “sed vi prezentis s-ron Birman kiel libriston. Ĉu librovendiston aŭ libroverkiston? Mi alvenante nevole aŭdis frazon kiu starigis dubon en mi.”

“Vi tute ne maldiskretas”, respondis Cezaro Birman. “Mi estas triobla, speco de Sankta Triunuo...” – Rijoka ekridis – “profesie

librovendisto, ŝatokupe librovoranto, fantazie libroverkisto” (134–135).

Mi tre ĝuis ĉi tiun krimromanon, kiu konvenas por progresantoj. Ĝia rakontintrigo amuzas, kaj mi ŝatas la petolemecon kaj lingvostilon de la verkisto.

Libroj en la Ĉu-serio:

- *Ĉu vi kuiras ĉine?* (1976)
- *Ĉu li bremsis sufiĉe?* (1978)
- *Ĉu li venis trakosme?* (1980)
- *Ĉu ni kunvenis vane* (1982)
- *Ĉu ŝi mortu tra-fike?* (1982) (priseksa krimromano)
- *Ĉu rakonti novele?* (1986) (novelaro)

Valano, Johán. *Ĉu li bremsis sufiĉe?* 3-a eldono. 168 paĝoj. Esperanto-Asocio de Britio, 2022. ISBN 978-0902756434.

Ĉe Amazon <<https://amzn.to/3dFn32z>>.



Debra HAMEL

Debra estas verkisto de pluraj libroj pri antikva Grekujo (en la angla). Ŝi esperas daŭre plibonigi sian scipovon de Esperanto kaj verki pli en la lingvo. Ŝi loĝas en Konektikuto,

Usono.

<hamel.debra@gmail.com>

Faba fabelo

mikronovelo • Benson SMITH

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelo-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj devas esti precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli. Ĉu vi emas verki tiel? Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Iun tagon, la patrino diris al Joĉjo: “Iru foiren kaj vendu nian maljunan bovinon, ĉar ni bezonas monon. Kaj ne estu stultulo, kiel ĉiam!”



Joĉjo eĉ ne atingis la foiron, kiam li renkontis viron, kiu proponis al li mirindan prezon. Li revenis frue hejmen.

“Do, Joĉjo, kion vi ricevis kontraŭ nia kara bovino?”

Joĉjo fiere malfermis la manon: “Jen, Panjo, magiaj faboj!”


La patrino furiozis pro lia stulteco kaj, ekkaptante la fabojn el lia mano, ĵetegis ilin tra la fenestron.

La sekvan matenon, tamen, Joĉjo frue leviĝis, rigardis tra la fenestro, kaj vidis ... nenion. Ĉar **MAGIAJ FABOJ NE EKZISTAS, STULTULO.**

Krucvortenigmo

enigmoj • Timothy BORONCZYK

Jen nova krucvortenigmo danke al Timoteo BORONCZYK. Inter la solvintoj ni lotumos \$10-rabaton de la libroservo. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la 25-a de Oktobro**. Bonŝancon!



Horizontale

1. Milda tuŝet'
4. Religia fordonac'
8. Ceremoni' kun akvo
12. Amata
13. Kvitiĝe transdoni monon
14. Konservita parametr' de programo
16. Simpatia ul'
17. Plaĉa flarcel'
18. Fari strekojn sur io
19. Il' por kapti fiŝojn amase
20. Komparacia grado
21. Pensaj'
23. Ĝena enu'
24. Eligi lumon
26. Il' por preni, porti, teni
28. Alaska best'
30. La plej evoluita mamul'?
32. Melproduktanta insekt'
36. La plej norda region'
39. Ringforma insul'
41. Fali en likveroj
42. Sufoka serpent'
43. Sinonimo por 26 horizontale
45. Baza er' de vivulo
46. Iomete malpli ol duonhektar'
48. Ŝanĝi pozicion de io
49. Elparoli
50. Harmonia voĉson'
51. Antikva senmotora veturil'
52. Respektoplene al religiaj aferoj
54. Malkonsenti

56. Teatra rolant'
60. Duop'
63. Prepozicio de akompano
65. "Bona ____o sin trenas testude, malbona kuras rapide."
67. "____ ŝlosilo ĉiun pordon malfermas."
68. Influi
70. Kontraŭa ag'
72. Insekt' kiu timas la lumon
73. Trempsaŭc' por fritoj
74. Facile cedanta
75. Elfiltra organo
76. Senharigi
77. Kolorita okulpart'
78. Vigla plirapidig'

Vertikale

1. Senfenestra ĉambret'
2. Ĝene eksciti
3. Uj' farita el tolo
4. Diafana juvela mineral'
5. Estigi, kaŭzi
6. Centr' de individuo konscia pri si mem
7. Paroli samsonene
8. Oceana mamul'
9. Eksterigi kapablon
10. Konstruaĵ' super rivero
11. Post due
12. Pun' de Avo Frosto
15. Neflugkapabla bird' formortinta
20. Font' de elektra energio
22. Reĝin' de la kartoj
25. Longa kaj plata lignopeç'
27. Pafaj' de pafarko
29. Muslamamik'?
30. Alta estim' meritita
31. Martinia frukt'
33. Dispecigi beston por viando
34. Antikve hipoteza substanc' tra la universo
35. Paska flor'
36. Prakalkulil'
37. Prezentanta malmolan terkruston
38. "Ne ____o kaj sango, sed la koro faras nin patroj kaj filoj".
40. Rilata al punkto, pri kiu oni parolas
44. Korpopart' en 1 horizontale
47. Sicilia vulkan'
49. Verkisto Liven ____, alinome Miguel GUTIÉRREZ ADÚRIZ
51. Kolektiva pronomo
53. Malspecifa tempo
55. Provizi per ĉio necesa
57. Akcept' de ies ĉeesto
58. Citrusa frukt'
59. "Ne venos ____ mem al kato."
60. Malbona ag'
61. "... kaj rapide kreskas la ____o ..."
62. Havanta monon
64. Signi per distinga vorto
65. "Li tremas kiel aŭtuna ____o."
66. "Mi fartas bone, ĉar mi havas ____on." (frazo en Duolingo)
69. Onklid'
71. Malgranda ŝvittru'
72. Bostona Esperanta grupo, minus 6 vertikale